ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

9

SEPTEMBRO 2018 Kol. 401/34

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Alzheimer, Memortabulo al Lorenc, Astronomia horloĝo, Unua pentraĵo de Leonardo, Mallongigo de vorto, Forpasis

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Espero por Alzheimer-malsanuloj

Jen kio estas legebla sur la dorsa flanko de libro kiu titoliĝas: «La fino de Alzheimer: la unua programo, kiu preventas kaj inversigas la scikapablan kadukiĝon» (en la angla: The end of Alzheimer's: the first program to prevent and reverse cognitive decline). La aŭtoro estas d-ro Dale Bredesen kaj la libro estis eldonita en 2017 en Usono.



Ĉu Alzheimer-malsano estas ankoraŭ nekuracebla? Ne. Post jaroj de esplorado d-ro Dale Bredesen kaj lia skipo de la Universitato de Kalifornio finpretigis kompletan programon, kiu ebligas al multaj malsanuloj trafitaj de Alzheimer kaj de scikapabla perdo, retrovi sian povon memori, pensi kaj denove konduki normalan vivon.

Celante unu post la alia la multajn faktorojn, kiuj kaŭzas la malsanon, agante sur la nutrado, la hormona stato, la inflamo, la toksoj, la fizika ekzercado… «ReCODE» produktas impresajn rezultojn.

El la unuaj dek pacientoj de d-ro Bredesen, kiuj sekvis dum kelkaj monatoj la procezon «ReCODE», naŭ spertis signifajn plibonigojn, ofte mirindajn. La studo estis publikigita en la jaro 2016 en la revuo «Aging» (Maljuniĝi).

De tiam, «ReCODE» sanigis centojn da pacientoj: pli ol la duono tute ne plu havas simptomojn. Destinita por pacientoj, kiuj jam estas trafitaj de Alzheimer, por pacientoj kun prodromaj simptomoj kaj por personoj kun alta risko de disvolviĝanta malsano, tiu libro donas ĉiujn ŝlosilojn por inversigi la scikapablan kadukiĝon. Tiu libro estas por la pacientoj, iliaj proksimuloj kaj la flegistoj, evento kun giganta scienca kaj medicina graveco.

Neŭrologo, d-ro Dale Bredesen dediĉis pli ol 30 jarojn al la esplorado pri degeneraj malsanoj. Li interalie laboris en la laboratorio de Nobel-premiito Stanley Prusiner, antaŭ ol esti profesoro en la Universitato de Kalifornio. Li estris la esplor-programon pri maljuniĝo de la Instituto Burnham, antaŭ ol fondi la Instituton Buck, dediĉitan al pristudo de maljuniĝo.

Skribis Dinah McKenzie-Peers el Francio

La memortabulo de F. V. Lorenc

Pli ol 40 esperantistoj renkontiĝis ĉe solena senvualigo de la memortabulo de František Vladimír Lorenc, (en esperantujo fame konata kiel Francisko Valdemaro Lorenz), al honorigo de la

patrioto de vilaĝo Zbyslav. Lorenc estis pedagogo, tradukisto, poeto, ĵurnalisto, kuracanto, filozofo, filantropo kaj ĉefe genia poligloto.

Li konis pli ol 80 lingvojn aktive, kaj 24 lingvojn pasive. La solena senvualigo de la memortabulo de F. V. L. efektiviĝis antaŭ biblioteko en Vrdy, kiu de la 1-a de julio 2018 portas lian nomon. La tabulo estas verko de la skulptisto kaj restaŭristo, nia AEH-membro Zdeněk Myslivec el Bozkov.

La solenaĵon partoprenis krom la urbestro de la komunumo Vrdy s-ro Antonín Šindelář, la honora gasto – konsulino de Ĉeĥa respubliko en Brazilo inĝ. Pavla Havrlíková, la eldonisto Petr Chrdle, la aŭtoro de la memortabulo Zd. Myslivec kaj pluaj esperantistoj.

Grandan meriton por organizo de la evento havas la bibliotekistino magistro Petra Kobelová el la loka biblioteko. Lorenc lernis la internacian lingvon Esperanton en sia junaĝo, verkis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj, sed en sia 20-a vivjaro li devis migri al Brazilo, kie li travivis la reston de sia vivo. Li estis la tria plej konata ĉeĥdevena persono en Brazilo apud la brazila prezidento

Juscelino Kubitschek de Oliveira kaj la entreprenisto Jan Antonín Baťa.

Sekvis tion brazila dokumenta filmo pri kapabloj de Lorenc en sukcesa ĉeĥa dubligo de Vl. Türk kaj V. Procházková. Antaŭ la fino de la programo la partoprenantoj vizitis pere de vilaĝa buso Zbyslav - la naskiĝlokon de Lorenc kaj en la preĝejo informiĝis pri ĝia historio. Sed la dometo de F. V. Lorenc estas en tre malbona stato kaj espereble ĝi estos rekonstruata, juĝante laŭ la granda amaso da sablo antaŭ la dometo. J. Rýznarová

Slovaka astronomia horloĝo

La okcidentslovaka komunumo Stará Bystrica, kiu havas preskaŭ 3 milojn da loĝantoj kaj troviĝas en altitudo de 484 metrojn super la marnivelo, proksima al la distrikta urbo Ĉadca, ekefektiviĝis en la jaro 2003, kadre de renovigo de la urboplaco, turisman allogaĵon – astronomian horloĝon.



La planojn ellaboris la akademiaj skulptistoj Viliam Loviška, kaj Marcela Lovišková kaj la arĥitekto Ivan Jarina.

La horloĝo estis kompletigita en la jaro 2009 kaj temas do pri unu el la plej novaj astronomiaj horloĝoj en la mondo. Ĝi troviĝas en la flanka muro de loka kulturdomo. La verko havas formon de stiligita fizionomio de la patronino de Slovakio Maria-Virgulino Sepdolora kaj pro tio estas indikita kiel la plej granda ligna statuo en Slovakio.

En niĉoj de la konstruaĵo estas lokitaj jenaj plastikaĵoj de la Nitra princo Pribina (825 – 833), de la regnestro de la Grandmoravia Imperio Svatopluk (871 – 894), de la slovaka

nacia reviviganto kaj leĝolingvisto Anton Bernolák, de la kodifikisto de la nuntempa slovaka lingvo Ludovít Štúr, de la slovaka politikisto, la generalo de la franca armeo, astronomo Milan Rastislav Štefánik kaj de la ĉefa persono de slovaka nacia movado Andrej Hlinka. En ĉiu horo okazadas promeno de lignaj figuretoj de la sanktuloj ligitaj kun Slovakio, nome Cirilo, Sankta Metodo, la slovaka benediktano kaj ermito Svorad Ondřej (980 – 1030), la unua slovaka martiro, ermito Benadik, sepnombrulo Gorazd, la hungara martiro Bystrik kaj la dua praga episkopo Adalberto.

La meĥanismon de la astronomia horloĝo planis kaj konstruis la praga firmao SPEL speciale por situo de Stará Bystrica. La aparato montras la astronomian tagmezon, alĝustigitan precize sur tempo de la loka meridiano derivita de atomhorloĝo regata de tempsigno DCF77, poziciojn de la Suno kaj Luno sur la firmamento, fazon de la Luno kaj la planedan horloĝon.

La koloroj de la astrolabo simbolas la fazojn de la tago, de la ruĝa sunleviĝo, trans pale blua tago al nigra nokto. Oraj pasamentoj signas la ekvatoron, Kaprikornan kaj Kankran tropikojn kaj lokan meridianon. Ĝi signas, kiam estas la Suno en zenito super la komunumo, do linion, kiu montras, kiam la Suno estas plej alte super Stará Bystrica.

Parto de la astronomia horloĝo estas du sonoriloj: „cimbalono“, batanta la tempon kaj sonorilo akompananta promenon de sanktuloj. La horloĝon plie ornamas vulkandevena ŝtono riolito kaj sublumigitaj tabuletoj el oniksa marmoro. Sub la horloĝo estas malgranda galerio kaj informcentro. Estas ĉi tie statuoj de slovakdevena amerika astronaŭto E. A. Cernan kaj de la konata

aktoro Jozef Króner. Oni vendas ĉi tie memormedalojn de la astronomia horloĝo. La horloĝo estis konstruita plejparte koste je la mono donita de sponsoroj kaj el enspezoj de publikaj kolektoj kaj kostis proksimume 133 mil eŭrojn.

El la interreto tradukis Josef Hron.

La unua pentraĵo de Leonardo

En junio 2018 interesa informo skuis la mondon de arto. Por emocio inter la fakuloj, anonciĝis en Romo la aŭtentikeco de eta azuleĥo el koto, sur kiu aperas la profilo de Anĝelo Gabrielo. Post 3 jaroj de la profunda esplorado fare de specialistoj en la kampoj de tekniko, scienco kaj historio, per 6mil-paĝa dokumento, oni fine asertis, ke ĝi estas la unua pentraĵo farita de la plej granda geniulo, kiu iam vivis en nia mondo: Leonardo da Vinci. La verko estis farita en la jaro 1471, kiam la artisto estis 18-jara. La objekto estas kvadrata, kun 20-centimetra latero kaj dikeco de 1,2 centimetroj.

Tiu artaĵo apartenas al la familio Fenice da Ravello, kaj oni ne povas kalkuli ĝian monan valoron. Supozeble, la figuro de la anĝelo estis pentrita surbaze de mem-portreto. Unu el la elementoj, kiuj garantias la aŭtentikecon de la verko, estas la subskribo de la nomo de la aŭtoro, kurioze farita sur la vizaĝo de la anĝelo: “Da Vinci lionardo LDV”, parte kaŝita sur la makzelo kaj kovrita de la lasta baktavolo de la azuleĥo. Tio pruvas, ke oni ne povus poste falsi ĝin. En la jaro 2005 oni anoncis la eltrovon de alia antaŭe ne konata pentraĵo de Da

Vinci: La Mondsavanto. Sed diversaj fakuloj kontestas lian aŭtorecon rilate al ĝi.

Leonardo da Vinci naskiĝis en Florenco (1452) kaj mortis en Francujo (1519). Kompare kun aliaj artistoj, li ne pentris tre grandnombre. Nur 15 liaj pentraĵoj estis konataj ĝis nun, inter kiuj la famegaj Mona Lisa kaj La Lasta Manĝo. Fakte, li febre sin dediĉis al multaj aliaj esplorkampoj en matematiko, inĝenierarto, inventado, anatomio, skulptarto, arkitekturo, botaniko, poezio, muziko. Li inventis interalie pramodelojn de helikoptero, milittanko, paraŝuto kaj skafandro.

Unu el la plej interesaj kreaĵoj de Leonardo estas la desegnaĵo La Vitruvia Homo, farita en 1490. Ĝi reprezentas la idealon de beleco, harmonio, ekvilibro kaj perfekteco de proporcioj, kaj inspiriĝis de la verko de la roma arkitekto Vitruvio Poliono, kiu vivis en la unua jarcento antaŭ Kristo. La desegnaĵo estas 34 centimetrojn alta kaj 24 centimetrojn larĝa. Matematikaj kalkuloj montras perfektajn proporciojn inter la partoj de la homa korpo, kiu staras meze de cirklo kaj kvadrato. Ĝi simbolas filozofion esence gravan en la renesanco: pri la homo kiel la centro de la universo kaj la racio kiel lia plej alta valoro.

Paŭlo Sergio Viana el Brazilo

A h o j!

Kion signifas la saluto AHOJ? Ĝi estis en pasinteco ŝatata saluto de maristoj. La vorteto AHOJ estis skribita sur ĉiu ŝipo. Tiu ĉi saluto antaŭ longe ĉe ni hejmiĝis. Per ĝi salutas ne nur infanoj, sed ankaŭ plenkreskuloj.

Sed kiu scias ĝian originan signifon? De kio estiĝis ĝia mallongigo? Tio estas interesa informo – la homo senĉese povas ion lerni. Ĝi estas mallongigo de la vortoj: **"Ad HOnorem**

Jesu" **(Al honoro de Jesuo Kristo).** Do, AHOJ miaj karaj !

Atentigo: pri la UK en Lisbono vi trovos raportaĵon en la oktobra Informilo. Al la kongreso aliĝis pli ol 1570 esperantistoj el 75 landoj. El la Ĉeĥa respubliko gvidas 30-membran grupon la prezidantino de AEH kaj kiam mi kompilas tiun ĉi Informilon, la grupo estas ankoraŭ en Portugalio.

Jarmila Rýznarová.

Tristaj anoncoj:

La 3-an de majo 2018 forpasis nia membro Antonín Bretšnajdr el Skalice n.Svit. (*16.2.1928), kiu nian AEH regule subtenadis.

La 23-an de junio mortis la edzino de la multjara gvidanto de la Esperanto-klubo „Amikeco“ en la urbo Česká Třebová, s-ino Anna Pištorová en la 84j. Kelkajn jarojn ŝi movis sin per rulseĝulo, tamen ŝi senĉese interesiĝis pri la Esperanto-movado en sia urbo. Honoron al iliaj memoroj. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.